Ludwig Lazarus Zamenhof,

# La espero

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion;
Al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

. . .

Ludwig Lazarus Zamenhof,

# Надежда

*tradukita de Семен Вайнблат*

Над землею новым чувством веет,
И призыв разносится по свету.
Он на крыльях, словно легкий ветер,
Облетает быстро всю планету.

Не мечом - оплотом разрушенья -
Он сплотить мечтает все народы, -
Людям, утомившимся в сраженьях,
Обещает мир он и свободу.

Все, кто верит в счастье дней грядущих,
Собрались под мирные знамена.
Под звездой идеи всемогущей
Стали мы сильнее и сплоченней.

Стены недоверья вековые
Разобщили страны и народы,
Но сметет препятствия любые
Светлая любовь - сестра свободы.

Овладевши языком общенья,
Хорошо друг друга понимая,
Будут жить народы, без сомненья,
Как семья единая земная.

. . .

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-377-742 (2006-12-28 23:25:19)*

Полные энергии и страсти
Не устанем яростно трудиться,
Чтоб мечта, которой нет прекрасней,
Для людей смогла осуществиться.

*Traduko de la Esperanta poemo "La espero" de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14) en la Rusan de* Семен Вайнблат *(∗1936-03-30).*

*Arg-377-893 (2009-11-04 21:50:48)*

*Prenita el la retejo* `http://miresperanto.narod.ru/tradukoj/zamenhof.htm`*. La verkinto, s-ro Vajnblat, donis al mi en retletero de l' 24.04.2008 la permeson publikigi siajn esperantigojn de poemoj en mia retejo "www.poezio.net".*